

Ankaŭ ĉi tiuj rifoj portas svernejn da brilkoloraj loĝantoj. La eburkoloraj aŭ ruĝetaj koralpolipoj formas la bazon, sed inter ili sidas hidroidoj, aktinioj kaj vermoj en siaj propraj tuboj atendante manĝaĵojn, kiuj drivas rekte en iliajn buŝojn. Inter la branĉoj de la koraloj, en fendoj kaj kavoj, rampas libere vivantaj vermoj kaj aliaj rabobestoj kiel moluskoj, krustacoj kaj eĥinodermoj. Ĉiuj kapablas penetri en la plej mallarĝajn malfermaĵojn aŭ kroĉiĉi al la branĉoj de la koraloj, tiel ke la fluo de la akvo ne forportu ilin. Ĉirkaŭ la rifo naĝas diversaj fiŝoj, kiuj tie ĉiam trovas frandaĵojn. Unu el la plej okulfrapaj loĝantoj de la rifoj estas granda, brilkolora ofiuro - oide nomata „meduzkapo”, Gorgoncefalo meduzkapa (Gorgonocephalus caput medusae), kun siaj multbranĉaj brakoj.

Kiam la profundeco aŭ la akvoŝluoj ŝanĝiĝas, la koraluloj mortas; sed la branĉigintaj kalkskeletoj restas starantaj. Ankaŭ tiaj mortaj rifoj prezentas loĝoblecojn por abundo da aliaj organismoj, plejparte aliaj specioj, ol sur la vivaj rifoj. Tiajn mortajn rifojn oni trovas ofte proksime sub la marsurfaco, en la Oslofjordo en unu loko troviĝas malgranda rifo nur 5 m. sub la surfaco. Aliloke oni trovas restaĵojn de rifoj eĉ surtere, ĝis 100 m. super la marnivelo. Tiuj rifoj formiĝis kiam dum la glaciepoko la glaciego premis la landon kelkcent m. mal-supren. Kiam la glaciego degelis, la lando iom post iom leviĝis, la koralrifoj atingis situon tro malprofundan, kaj sekve mortis. Sed iliaj skeletoj daŭre atestas pri tio, kio okazis dum la lastaj geologiaj periodoj.

La koralrifoj formas apartajn ekosistemojn en la maro, sed ilian signifon por la ekologio de la maro oni ankoraŭ ne plene komprenas. Tiel ilia pristudado daŭras kaj ĉiam pli kaptas la intereson de la mar-biologoj.

Rimarkoj pri la esperantigo de germanaj onomastikaĵoj  
Klaus Perko (Aŭstrio) \*

Rilate al la tre interesa artikolo "Provizora regularo por esperantigo de germanaj onomastikaĵoj" de Rikardo Sulco en Scienca Revuo, n-ro 1 (149) mi volas fari kelkajn rimarkojn.

Ĉar mi ne estas lingvisto, sed nur uzanto kaj de Esperanto, kaj de la germana lingvo, ankaŭ mi ne sentas min kompetenta komenti la problemojn science; do miaj rimarkoj havas ĉefe praktikan karakteron el la perspektivo de lingvo-parolanto. Mi ankaŭ ne volas trakti la principan demandon, ĉu en la nunaj cirkonstancoj - kiam Esperanto ankoraŭ ne estas ĝenerale enkondukita - estas konsilinde, uzi amplekse ĉiujn proprajn nomojn en esperantigita formo. Eble nur post la universala akcepto de Esperanto ekestos vera bezono plene asimili ĉiujn naciajn nomojn. Cetere en pluraj okazoj - ekz. ĉe derivaĵoj - jam nun la esperantigo nepre necesas. Kiel estas konate, multaj rekomendas nun esti pli retenigebla. Sed tio ĉefe estas afero de taktiko. Ĉiuokaze eventualaj tiaj rezervoj ne povas malhelpi, ke ni jam nun pripensu, kiamaniere esperantigi proprajn nomojn por la okazo, ke oni volas (aŭ devas) uzi ilin.

La principa decido devas okazi inter grafismo (laŭebla konservado de la kutima skribita formo) kaj fonetismo (laŭebla konservado de la parolata formo). Kompromisoj inter la du principoj havas la malavantaĝon, ke ili estas plej ofte arbitraj kaj nelogikaj. Por ĉiu okazo mi tamen volas akcenti, ke jam enkondukitaj kaj firme establitaj esperantigoj kompreneble devos resti (kiel ekz. Munkeno/Munĥeno, Nurenbergo); sed ili ne nepre devas esti gvidmodeloj por novaj asimiladoj.

Sulco klare decidis por la fonetismo kaj do prenas kiel elirpunkton la germanan prononcon. Tio postulas laŭ mia kompreno, ke oni en ĉiu okazo elektu tiujn fonemojn de la esperanta sonsistemo, kiuj estas la plej proksimaj al la originalaj nacilingvaj sonoj.

Tiurilate la aŭtoro ne estas konsekvenca ĉe la germanaj sonoj Ŭ kaj Ū. Li argumentas per la historia evoluo (palataligo) kaj venas al oj kaj uj (au eĉ aldono de "j" en la sekvanta silabo). Tamen, konsiderante nur la aktualan proksimecon de la esperantlingvaj sonoj, sendube la plej similaj al o kaj u estas respektive e kaj i.

Kvankam mi konscias, ke dialektaj formoj ne donas tre fortan argumenton, mi tamen volas mencii, ke en multaj dialektoj de la germana lingvo (almenaŭ tiuj parolataj en Aŭstrio) ö kaj ü laŭtendence tre proksimiĝas al e kaj i (ekz. schön sonas kiel ŝen, kaj fünf kiel finf). Tiel same kutimas prononci ankaŭ eksterlandanoj, ĉefe slavoĵoj, kiuj en siaj lingvoj ne havas ö kaj ü, dum kiam ili ankoraŭ ne tre bone regas la germanan lingvon. Tiel montriĝas kvazaŭ nature elekto de la plej proksima sono disponebla el la propra lingvo. En simila situacio estas ankaŭ la esperantistoj.

Do mi proponas "Arnoldo Ŝenbergo" por Arnold Schönberg (ne "Ŝojnbergo"), "Ŝenbruno" por Schönbrunn (ne "Ŝojnbruno"), "Anastazio Grino" por Anastasius Grün (ne "Grujno"), kaj "Mirco" por rivero Mürz (ne "Murcjo").

Mi dubas pri "aj" por germana "ei". Kiel estas dirite ankaŭ en la noto de la redaktoro, la prononco estas ie inter "aj" kaj "ej". En tia duba okazo eble tamen povas decidi la grafismo.

Alia grava vidpunkto estas, ke geografiaj sed ankaŭ personaj nomoj havas regionan karakteron, kaj tial oni devas konsideri ankaŭ la regionan lingvouzon. (Sub tiu ĉi mi ne komprenas la lokan dialekton, sed la regione specifan prononcon de la norma literatura lingvo fare de klera parolanto.) En tiu kunteksto la prononca regularo de "Siebs" - - kiu nur estas fikcio rilate al la vivanta lingvo - ne povas esti normo. - Ekz. en Aŭstrio la litero ß en la komenco de la vorto ne estas parolata kiel z (eĉ ne de kleraj homoj, kiam ili parolas la norman lingvon), sed ĝi havas sonan kvaliton inter "s" kaj "z"; Ĝi estas malforta, sed tamen senvoĉa "s". Tial ekz. Salzburg povas esti esperantigita fonetike nur per "Salcburgo" (kaj nepre ne per "Zalcburgo"). Simile ĉiuj aliaj aŭstraj propraj nomoj komenciĝantaj per ß devas konservi tiun literon ankaŭ en esperantigita formo (do ekz. "Sonenfelso" por "Sonnenfels" kaj ne "Zonenfelso"; "Sutnero" por "Suttner" kaj ne "Zutnero"; "Sedingo" por "Söding" kaj ne "Zojdingo").

\* d-ro pri juroscienco, Lendkaj 111, A-8020 GRAZ.

Zur Esperantisierung deutscher Eigennamen

Der Beitrag ist eine Reaktion auf den Artikel "Provizora regularo por esperantigo de germanaj onomastikaĵoj" von Rikardo Sulco in Scienca Revuo Nr. 1 (149).

Bei der Assimilation von Eigennamen kann grundsätzlich entweder von der originalsprachlichen Schreibweise oder von der Aussprache ausgegangen werden. Sulco hat sich klar für die zweite Möglichkeit, die lautentsprechende Assimilation (auf Grund der phonetischen Orthographie des Esperanto), entschieden. Ohne auf diese Frage näher einzugehen, wird auf Grund der von Sulco selbst vorgeschlagenen phonetischen Assimilation die Auffassung vertreten, daß den deutschen Umlauten Ö und Ü innerhalb des Esperanto-Lautsystems die Phoneme E und I am nächsten stehen. Konsequenterweise müßten diese daher bei Anwendung der phonetischen Assimilation den Vorzug vor anderen Lösungen erhalten. Die sprachgeschichtliche Entwicklung sollte gegenüber diesen phonetischen Gesichtspunkten nicht ausschlaggebend sein.

Weiters müßten - gerade bei Eigennamen - die regionalen Unterschiede in der Aussprache der deutschen Sprache berücksichtigt werden; das Aussprachebuch von Siebs erscheint in diesem Zusammenhang nicht anwendbar. (Gemeint sind klangliche Varianten der Standardsprache, nicht etwa lokale Dialekte.) Als Beispiel wird angeführt, daß etwa in der Sprache des Österreichers das anlautende S nicht stimmhaft gesprochen wird.

Pri tiu ci Bulteno

En la Bulteno la kasisto denove informas vin pri la elspezoj de la antaŭaj publikaĵoj. Ni presas kaj ekspedas en kunlaboro kun S-ro Peeraerts de la Grafika Centro Antverpeno, ĉar preskostoj kaj ekspedkostoj estas en Belgio sufiĉe favoraj.

ISAE presigis	400 Bulteno 1990(50)	0169.20 SF	0.42 po 1
	400 SR 39(1988)-155	2063.20	5.16 po 1
kaj ekspedis	340 kajerojn	0754.00	2.22 po 1
sumo.....		2986.40	7.47 po 1

La averaĝa kosto de unu ekspedita SR 39(1988) inkluzive Bulteno estas..... 7.80 po 1.

Tiuj ĉi kostoj de unu kajero estas tro altaj.  
(Vidu ankaŭ la kontosaldadon de la legaco Uhlen).

Mi bedaŭras, ke la nova presisto ne plenumis la preparolitajn kondiĉojn pri presmaniero (vidu punkto 7 en Bulteno 50 "Enasocia Evoluo"), sed propraautoritate parte rekompostis. Tiumaniere la financado endanĝerigas. Mi finos mian laboron por SR, minimume ĉe GCA, se tio ankoraŭfoje okazas.

LA SEKRETARIO-KASISTO ATENTIGAS LA DELEGITOJN DE TIUJ LANDOJ, EL KIUJ NI NE POVAS RICEVI LA KOTIZOJN:

pro kostaj kauzoj la presisto sendas la SR al ĈS, H, PL kaj ankaŭ al Brazilo (vidu punkto 10 Enasocia Evoluo) en unu pakajo kun enmetitaj etiketoj al la Landa Delegito au al la Landa Esperanto-Asocio.

La delegitoj de ĈS, H, PL dissendu al la membroj tiumaniere uzante la kotizojn, kiuj ne estas transpageblaj.

Ni devas ŝpari la ekspedkostojn.